




ACERO

Acer

 1986

Ĉiuj amas la aceron. La kanadanoj, kompreneble, pro sia mondfama sirop d'érable (acera siropo) el Kebekio. Ili eĉ elektis la acerfolion kiel ilian nacian simbolon. La japanoj tiom ŝatas admiri la belajn ruĝajn kaj flavajn nuancojn de la aŭtunaj folioj, ke ili eĉ havas vorton por ĝi: momijigari. Ili faras el ĝi belajn bonsaĵojn. La infanoj tra la mondo ludas per la flugilhavaj fruktoj kiuj senfine turniĝas en la aero kiel helikoptero kaj tiel portas la manĝeblan semon tre malproksimen. Kaj kompreneble ankaŭ la metiistoj, kiuj volonte uzas la lignon por mebloj, plankoj kaj violonoj, kiel Stradivarius faris.

Eĉ la Troja Ĉevalo ŝajne estis farita el acero. Ĝi estas tre populara arbo kaj nun ekzistas tiom multaj tipoj de aceroj, ke specialaj botanikaj ĝardenoj (aceretums) estas dediĉitaj al ĝi: la plej granda en la mondo situas en Boskoop.



www.josvertelt.nl



Ook in andere talen



Also in other languages



Ankaŭ en aliaj lingvoj

